

Árpád Rátkai

ESPERANTO EN HUNGARIO

1. ANTAŬ ESPERANTO

La skizon de la lingvoprojekto Volapuko en 1879 aperigis la katolika pastro Johann Martin Schleyer¹ en Germanio. Leginte ĝin hungarlanda germano Georg Bauer (post nomŝanĝo György Bánfi²) tuj iĝis adepto de Schleyer. En Hungario aperis volapukaj lernolibroj, vortaroj kaj eĉ libroj en Volapuko. La movado kulminis en la jaroj 1888-1889 kune kun la alilandaj, sed poste rapide regresis kaj disfalis. Volapuko pruviĝis maltaŭga por Internacia Lingvo. Bánfi kaj kelkaj aliaj volapukistoj maljunaĝe esperantistiĝis jardekojn poste.

2. LA KOMENCO

Kvankam la Internacia Lingvo de Lazar Markoviĉ Zamenhof (1859-1917) aperis sub lia plumnomo Dr. Esperanto aperis en 1887, en Hungario nur en 1897 aperis la unua esperantisto. Li estis la universitata profesoro Gábor Bálint (1844-1913) lingvisto, kiu reveninte el eksterlando gvidis la unuan Esperanto-kurson en la urbo Kolozsvár (nun: Cluj-Napoca ROM). Inter la unuaj esperantistoj estis presisto Pál Lengyel (1868-1932), kiu havis propran presejon en la urbo Szekzárd (ekde 1903 Szekszárd³). En 1900 li entreprenis la preson, kaj en 1901 ankaŭ la eldonon, kaj fine ankaŭ la redakton de *Lingvo Internacia*, la internacia revuo de la movado, tiam sola en la mondo. Sed en 1904 kune kun sia presejo li transloĝiĝis al Parizo.

3. UNU MOVADO - SINSEKVAJ NOMOJ

En 1902 en Budapeŝto kelkaj esperantistoj fondis landan societeton, kiu post kelkaj transformiĝoj kaj nomŝanĝoj funkcias ĝis hodiaŭ jene:

1902-1906 Unuiĝo de l'Hungaraj Esperantistoj (UHE) – *Magyar Eszperantisták Egylete (MEKE)*

1906-1911 Hungara Esperantista Societo (HES) – *Magyar Eszperantista Egyesület (MEE)*

1911-1950 Hungarlanda Esperanto-Societo (HES) – *Magyar Országos Eszperantó Egyesület (MOEE)*

1955-1960 (organizo de) Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro – *Országos Eszperantó Tanács (szervezete) (OET)*

1960-1991 Hungara Esperanto-Asocio (HEA) – *Magyar Eszperantó Szövetség (MESZ)*

ekde 1991 Hungaria Esperanto-Asocio (HEA) – *Magyarországi Eszperantó Szövetség (MESZ)*.

La agado de la papa prelado Sándor Giesswein (1866-1923), prezidanto de la societo kontribuis al la stabiliĝo de la movado. Kaj sendepende kaj ene de la landa asocio la esperantistoj fondis lokajn grupojn kaj aliajn societojn, precipe fakajn kaj specialajn. En 1913 Laboristaj esperantistoj laŭ la internaciaj tendencoj organiziĝis aparte, fondante Hungaria Esperantista

¹ La germana revueto Sionsharfe aperinta en Litzelstetten (ŝtato Baden) estis dediĉita al la katolika poezio. En 1879 apendico de la maja numero aperis skizo pri Volapuko.

² La nomo de Georg Bauer baldaŭ ŝanĝiĝis al György Bánfi. Oni erare identigis lin kun la kroata volapukisto Juraj Bauer. Li estis helpkatastriso en Kapuvár (germane: Kapuwar), poste katastristo en la urbo Sopron (germane: Ödenburg). En 1881 György Bánfi iĝis diplomita Volapuk-instruisto la dua en la mondo.

³ La mankanta klarigo de la ŝanĝo ekde 1903 kaŭzas problemon en bibliografioj, enciklopedioj ktp.

Societo Laborista (HESL) – *Magyarországi Eszperantista Munkások Egyesülete (MEME)*. Pro ĝia maldekstreniĝanta politika agado en 1934 oni malpermesis la agadon en 1934, kaj nur en 1945, post la malvenko de la nazia bloko ĝi refunkciis, fine la HESL-membraro korporacie aliĝis al HES en 1947.

4. LA UNUA ORA EPOKO

Ekde la dudekaj jaroj vigliĝis la movada kaj la esperantista agado, precipe la beletro. La elstaraj verkistoj Gyula Baghy (1891-1967) kaj Kálmán Kalocsay (1781-1976), la Ora Duopo, determinis la tutan internacian esperantan kulturon. Aperadis la revuo *Literatura Mondo* kaj prosperis la samnoma eldonejo.

En 1938 pro la dekstriĝanta hungara politiko la revuo kaj la eldonejo *Literatura Mondo* ĉesis. Malsukcesis savo de la eldonejo eksterlanden, sed la eldonisto Vilmos Bleier (1903-1940) sukcese forlasis Hungarion. Dum fuĝo li mortis en pariza hospitalo, en la tago de enmarŝo de germanaj trupoj.

5. DUOBLA REKOMENCO

Postmilite la movado reorganiziĝis eĉ ekprosperis, sed venis nova plago. Dum la stalinisma diktaturo en 1950 la esperantista agado preskaŭ komplete ĉesis. Post 1953 aperis signoj de reviviĝo, kaj ekde 1955 la tuta organiza strukturo reorganiziĝis, eĉ pluevoluis, kvankam nur ekde 1960 en la formo de landa asocio. Signo de stabiliĝo estis, ke HEA en 1961 fin-fine aliĝis al UEA, statute akceptante la politikan neŭtralecon. En la plej malfacilaj jardekoj Lajos Kökény (1897-1985) estis la animo de la reorganizoj.

Partoprenante la politikan reĝimŝanĝon HEA en 1986 kiel la dua societo en la lando, sendepende de la politika potenco elektis sian estraron, kaj en la sekva jaro modifis tiel ankaŭ sian statuton, malgraŭ la juraj preskriboj.

6. LA DUA ORA EPOKO

La jaroj 1960-1990 estis la dua ora epoko de Esperanto en Hungario. La instruado de Esperanto disvastiĝegis kurse kaj lerneje. Krom baz-kaj mezlernejoj ankaŭ en la budapeŝta universitato ELTE. La instruado pleje evoluis sub gvido de docento István Szerdahelyi (1923-1987), kiu verkis i. a. lernolibrojn k.a. studmaterialojn por la Esperanto-fako. Li redaktis, kun Ilona Koutny, la *Hungaran-Esperantan Mezan Vortaron* (1997), kun kontribuo de Otto Haszpra kaj Balázs Wacha.

La aktivado de esperantistaj pedagogoj (ILEI), kuracistoj (IMEK), fervojistoj (IFEF), kristanoj (KELI, IKUE), individuaj sciencistoj (ISAE) stimulis plu la tutan movadon. En 1979 la kultura komitato de la hungara parlamento rezolucie rekonis kaj apogis la instruadon de Esperanto. Dufoje estis aranĝata UK (Universala Kongreso de Esperanto) en Budapeŝto: en 1966 kaj en 1983.

HEA mem entre-prenis eldonagadon. Dum kelkaj jaroj grupo, en kiu elstaris la agado de inĝeniero profesoro Ottó Haszpra (1928-2012), geologo Endre Dudich kaj geofizikisto-naturprotektisto András Lukács kontribuis al la faka literaturo en Esperanto: *Scienca Eldona Centro (SEC: Sciencaj Komunikadoj, Fokuso, Geologio Internacia, la scienc-populariga libro Ĉu vi konas la Teron?* (konciza terhistorio).

7. NOVAJ KONDIĈOJ POR ESPERANTO

Ekde 1989 en Hungario okazis drastaj ŝanĝiĝoj en la politika kaj la ekonomia strukturoj, de kiuj la movado, krom malmultaj esceptoj, ne povis profiti. Regis senbazaj iluzioj pri la futuro, kaj iu grupo provis likvidi la „malmodernan praasocion” HEA. Dum la lasta kvarjarcento tiu likvidista grupo per lerta kaj kompleksa manipulado klopodis forigi la celaron de la „malmoderna praasocio” kaj sukcese instigis al eksiĝo de kelkaj organizaj unuoj de la societo. La likvidistaj elpaŝoj reduktigis la sinergion en la movado kaj ofte venenis la etoson de la diskutoj. Ĉiu unuopa eksiĝo malfortigis la asocion kaj disipis la energion de la movado. Ekregis daŭra malamikeco inter la aktivuloj. Tamen statute restis en la celaro, ke la Asocio per la aplikado de la internacia lingvo plifirmigas en siaj membroj la humanisman vidmanieron: klopodon al la paco, por ekkono kaj estimo de la komunaj valoroj de la homaro, la konscion de la interdependo kaj de la respondeco por la tuta homaro kaj ĝia medio. Baza principo de la Asocio restis repekto kaj efektivigo de la homrajtoj kaj ĉesigo de la lingva diskriminado. Malgraŭ kvarjarcenta klopodo la likvido de HEA malsukcesis.

En la universitato ELTE ĉesis la Esperanto-fako (1966-2007), sed daŭre eblas fari ŝtatan Esperantan lingvoekzamenon akceptatan de universitato kaj ŝtataj institucioj. Bona atingo estas, ke en 2001 Landa Fremdlingva Biblioteko aĉetis, deklaris protektita kaj enkorpigis la Kolektaĵon Fajszí de esperant-lingva kaj priesperanta literaturo. Ĝia duvoluma Katalogo aperis ankaŭ libroforme.

La elano de la instruado malpliĝis. Eminentaj hungaraj E- instruistoj laboras eksterlande. Ilona Koutny (Universitato Adam Mickiewicz, Poznań POL), Zsófia Koródy (Herzberg am Harz DEU, kun la oficiala kromnomo Esperanto-urbo, Katalin Kováts en Hago NED (edukado.net), István Ertl en Rotterdam NED (1991-2001 revuo Esperanto), poste en Luxembourg LUX (revuo Beletro). Novzelandano Stefan MacGill, de 1986 vivanta en Hungario estas prezidanto de ILEI, redaktoro de Juna Amiko.

En la jaroj 1992-2002 sub gvido de László Szilvási Eventoj estis la plej ofte (dusemajne) aperanta Esperanto-gazeto en la mondo. En la sekva jardeko dum la malrapida malapero de la papera gazetaro, la enmovada informado teknike pli bone funkcias per retpaĝoj, korespondaj listoj (esp-en-hung, heamembraro), eĉ dulingva retrevuo (Nordhungaria Informo). Daŭras la registradoj de faka literaturo kun elektronike alireblaj dokumentoj, Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko (de László Szilvási), de Esperantilioj en Hungario kaj Toponimio Hungaria. Diversaj E-kunvenoj regule okazadas, plej ofte en Budapeŝto.

E-grupoj funkcias en 20 setlejoj, plej aktive en Budapeŝto, Vác, Győr, Veszprém, Dombóvár, Pécs, Szeged, Debrecen, Miskolc kaj Eger. Kvankam en la okdekaj-naŭdekaj jaroj eksiĝoj malfortigis la asocion, likvido de HEA malsukcesis, la malstabiliĝo ĉesis. Partoj de la movado, ĉu en ĉu ekster la landa asocio strebas harmonian kulaboron, en kiu normaligiĝas la enmovadaj kontaktoj kaj disvolviĝas sinergio. HEA restis aktiva membro de UEA kaj EEU (Eŭropa Esperanto-Unio).